**EKO**

**Esperiga Komuniko**

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- La populara Manlibro havebla!!
- ILEI zorgas pri financa forteco
- Informado virina en Hungario
- ESF blogas kaj apogas


Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-51 sendita el Budapeŝto, la 3an de novembro.*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Pretas la Manlibro pri instruado!

Ni kun fiero informas vin, ke ILEI kaj partneroj finpretigis la delonge deziratan verkon: *Manlibro pri instruado de Esperanto,* pri kies kompilado kaj redaktado okupiĝis Katalin Kovats dum tiu ĉi tuta jaro. Ĝi estos baza fakliteraturo kaj nemalhavebla helpo por ĉiu, kiu instruas Esperanton aŭ gvidas kursojn, klubojn de esperantistoj. La libron eldonas ILEI, Edukado.net kaj E@I kune.

"Mi ankaŭ ĉi tie volas mencii la nemalhaveblan helpon, kiun la *korekto-teamo* de Edukado.net kaj la aliaj kunlaborintoj donis al mi por krei bonegan kvaliton. Ilian nomon vidu en la mendilo.




Detalojn pri la kunlaborintoj kaj enhavo vi povas legi en la oficiala antaŭmendilo. Se vi sendos vian mendon antaŭ la **20a de novembro**, vi povos iom ŝpari kaj ankaŭ helpi al ni scii, kiom granda estas la konkreta intereso, kiom da ekzempleroj ni presigu.

Do vizitu la retejon, legu ĉion kaj agu laŭ via bontrovo kaj ebloj. **Estos eblo plenigi la liberan spacon en la pakaĵo pere de la libretoj** ***Poŝamiko*** (kiu mendeblos kun rabato) kaj havi la saman sendokoston.

## Antaŭmendu la Manlibron nun!

Ek al la pli detala prezento kaj **mendilo de la libro:** https://manlibro.ikso.net/

Legu pliajn detalojn ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=840

Pro la ĝenerale altaj poŝtokostoj **ni sugestas al vi fari kunmendon kun amikoj,** loĝantaj proksime, ĉar la plej avantaĝa eblo estos mendo de tri libroj. E**blos subvencii kolegojn el malplipagipovaj landoj. Ni estu solidaraj**.

Katalin Kovats, ĝia redaktoro

# Kotizoj por ILEI por 2021

Okaze de ĵus finiĝinta reta voĉdono la Komitato de ILEI decidis sanigi la financan situacion de la Ligo per eta altigo de kotizoj. Jen la validaj kotizoj por 2021 (en EUR):

| A-landoj kun papera IPR | A-landoj kun reta IPR | B-landoj kun papera IPR | B-landoj kun reta IPR | A-landoj Supera membro | B-landoj supera membro |
|---|---|---|---|---|---|
| 25 | 12,50 | 12,50 | 6,25 | 40 | 22,50 |

Superaj membroj ricevas  nian organon ***IPR*** kaj nian revuon ***Juna Amiko*** papere.

Ni abonu kaj diskonigu nian revuon *Juna Amiko* ! Surpapera varianto de la revuo JA kostas A-lande €18; B-lande €13. Reta varianto kostas A-lande € 11, B-lande € 7.

La sugestoj, kiuj aperis dum la debato, estas bonaj kaj trafaj. (Estis kvaro da ili, inter ili la duonigo de la nombro de fizike presitaj revuoj - SMG). Ni certe konsideros ilin estontece.







Vi instruantoj kaj instruistoj de Esperanto malkovros lertigajn artikolojn en nia Revuo IPR. Do membriĝu! (Vi ne nepre devas esti edukisto! Sufiĉas, ke vi komprenu la gravecon de la edukado kaj la instruado de Esperanto- SMG.)
Vi, la samaj, povos uzi la enhavon de nia revuo *Juna Amiko* en via instruado. Do abonu !

Vi, legema kaj progresema persono, scivolema kaj distrema, malkovros interesajn tekstojn en nia kvarkolora kaj belaspekta revuo *Juna Amiko*. Do abonu !

Mirejo Grosjean kun aldonetoj SMG.

## Hungario konigas nian lingvon en grava virina gazeto




Ankoraŭ aktivas nia ĉefdelegito kaj kotizperanto en Hungario, la 85-jara Elizabeta Károlyné Ködmön (en la artikolo Erzsike"). Ŝi estas arda pntristo kun prizorgas grupon en sia urbo Táta, kaj realigis ekspoziciojn en la UK-kongresejo en 2016 kaj krome en la urbodomo de Nitra, subtene al tiu kongreso. Multaj pliaj atingoj menciindus, ĉiuj responde al la bezono prezenti Esperanton al pli vasta publiko. Nun, ni konigas la plejlastan atingon. Tri-paĝa intervjuo kaj artikolo aperis en la hungara revuo *Meglepedes* (Surprizo), kun legantaro de naŭdek mil personoj, la tria plej granda tia revuo en la lando. La grado de gazeta legado en la lando estas eksterordinare alta – ĉ. 80% de la popolo abonas aŭ aĉetas almenaŭ unu ĵurnalon aŭ gazeton. La merkato kaj la revubudoj estas


RIPORT

ERZSIKE A „TITKOS" NYELV SZERELMESE

„Én vagyok az eszperantó hazai őre"

Nem túlzás kijelenteni, az eszperantó nyelv hazai őre Ködmönné Erzsike. Történeteiből kiderül: nagyrészt neki köszönhető, hogy a különleges, könnyen elsajátítható nyelvből a mai napig lehet államilag elismert nyelvvizsgát tenni!

Kíváncsi kislányból födelegátus

16 Meglepetés


TÖRŐCSIK MARI VOLT AZ OSZTÁLYTÁRSA

Férje mindenben támogatta

Sokan köszönhetik neki a diplomát

SZUROVECZ KITTI

Meglepetés 17

superŝtopitaj!

## Novjorko kaj ESF havas novan komunikilon – IPI plias por servi lingvistojn

**Nova blogo:** [esfconnected.org](esfconnected.org) informas pri la laboro, servoj, atingoj, ktp de ESF, kiel publika vizaĝo de la fonduso al la klera ekstera mondo. Artikoloj estos verkitaj de la

estraro, subtenatoj, la konsilantaro, organizantoj de simpozioj, kaj apartaj invititoj. La blogo nun funkcias; bonvolu aboni, legi la afiŝojn kaj lasi komentojn!

La novaj eldonoj de IpI (Informilo por Interlingvistoj, 113) kaj IfI (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists, 13) haveblas rete:

### IpI (Esperante):

Trovu la novan kaj pli fruajn numerojn ĉe: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/

### IfI (angle):

Trovu ilin ĉe: http://www.esperantic.org/en/publications/ifi-information-for-interlinguists/

Informilo por Interlingvistoj estas publikaĵo de *Esperantic Studies Foundation* (ESF) kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). IpI kaj ĝia anglalingva eldono (IfI) disponigas informojn kaj ĝisdatigojn en la kampoj de planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado. Ambaŭ eldonoj enhavas detalojn pri eventoj, novaj publikaĵoj, raportojn pri lastatempaj konferencoj, kaj disponigas multajn aliajn informojn por universitatanoj kaj ĉiuj, kiuj interesiĝas pri interlingvistiko kaj rilataj kampoj.

Legu pli detale pri IpI kaj la lanĉo de IfI:

http://www.esperantic.org/eo/2017/07/20/esf-lancas-novan-bultenon-kaj-revivigas-alian/

La limdato por kontribui al la sekva numero estas la 28a de februaro 2021.

La redakcio (Simon Davies kaj Angela Tellier) ipi@esperantic.org

# Tumulto sekvos

Mi havas ankoraŭ informojn pri la nova informilo pri la agado de UN, pri ISAE kaj dekoj da pliaj eroj. La pandemia izoligo kreas amasojn da iniciatoj kaj informoj. Paciencon. La tekstoj transiros al EKO 52, 53 kaj 54.

SMG, via EKO-logo

======== Vortoj: 825 ========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.